# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Nia retbutiko

Esperantista klubo Brno ne nur organizas programerojn retajn kaj en la klubejo. Ĝi ankaŭ funkciigas malgrandan retbutikon kun esperantaj libroj. En ĝia stoko estas kaj libroj eldonitaj de nia klubo kaj ankaŭ libroj, kiuj estas alie apenaŭ troveblaj. Venu trarigardi nian oferton.

# Ni rekomendas

- Se vi pro laboro por UK ne scias, kia estis la UK en Brno, spektu filmeton de Rogener Pavinski.
- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc.
- La 29an — 25an de majo 2026, 37-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, Krakow, Pollando
- La 6an de junio 2026 Ludu kun ni!, Brno, organizas E-mental el Prago
- 23an-26an de julio 2026 43-a Pola Esperanto-Kongreso, Bielsko-Biała, Pollando.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio
- Trapasu KER ekzamenon, montru, ke vi regas Esperanton.

# Cetera programo en majo

La 13an **Nia aĉa vivo**, *diskuto, klubejo. Venu diskuti pri viaj malbonaj tempoj en via vivo kaj kiel vi skucesis eliri el tio. Ĉu tiu sperto plifortigis vin?*

La 20an **Kion ni legas***. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h. La regula rakontado pri libroj en Esperanto, kiujn ni legis. Pripensu jam nun, kiun libro vi prezentos. Se vi nenion legis en Esperanto, komencu legi tuj. Se vi ne havas esperantajn librojn, vi povas ili prunti en Moravia landa biblioteko (Moravská zemská knihovna) en Brno.*

La 27an **Amuzu, lernu kaj ridu** – Josef Vojáček*, klubejo*

---

# Programo en junio

---

La 3an **Naturismo** – Thierry Spanjaard (FR), *rete per Jitsi, je* **18.30**

La 6an **Ludu kun ni!**, *renkontiĝo*, organizas E-mental el Prago

La 10an **Rostumado**, *renkontiĝo, loko estos precizita*

La 17an *Ankoraŭ ne agordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.*

La 24an **Ekskurso al kastelo Veveří kaj digolago***, renkontiĝo, promeno. Detailoj aperos.*

Mi dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis aŭ ankoraŭ kontribuos printempe al la progromo. Mi ankaŭ dankas al tiuj, kiuj inspiris la programon. Kiel vi vidas, nia programo de nia flanko estas jam agordita ĝis fino de junio. Dum majo okazos du diskutoj. Ni esperas, ke la temoj estos alogaj kaj ke vi kontribuos. Junie okazos eĉ tri renkontiĝoj (unu sabata estas organizata de E-mental). Ĉu tio estos alloga por niaj klubanoj kaj favorantoj, kiujn ni kutime en la klubejo ne vidas? Ne hezitu kaj venu.

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

---